

# EA KROKODILO

Esperanto\***Kultur**\*Centro

1 rue Jean Aillet

FR-31000 TOULOUSE

☎ +33 61.25.55.77 ☎ +33.61.81.95.65

N-ro 13 – januaro-februaro 1996

Permanences – le mardi, 16h-18h.

## Aktuale . . . ★ . . . Actualités

### Nova estraro en E\*K\*C

Post la ĝenerala jara asembleo, kuniĝis la elektitaj membroj por starigi la novan komitaton.

Prezidantino: Jeanne-Marie Cash

Vic-Prezidanto: Floréal Martorell

Kasistino: Miquela Catlla

Sekretario: Jacques Caubel

Membroj: Michel Boissinot, Pierre Junyent, Laurence Monterde.

### La radio à Toulouse

Écoutez chaque semaine:

– 92,2 MHz. Canal Sud. Lundi 20h-21h.

– 89,1 MHz. FMR. Mardi 18h-19h.

– 98,3 MHz. Radio Occitania. Jeudi 19h-20h.

Et une nouvelle émission:

– 90,1 MHz. Radio Mon País. Un mercredi par mois, 11h-12h.

La prochaine émission aura lieu le 21 février. Lisez le rapport des premières émissions dans la rubrique »Farite«, p. 3.

### Adhérez aux Associations Espérantistes

Vous vous intéressez ou participez à l'action d'E\*K\*C. C'est très bien, car notre association regroupe pour les activités locales des espérantistes de diverses tendances. Mais il ne faut pas oublier les niveaux plus larges. Ainsi qu'en France il y a deux associations importantes: UFE liée à UEA, et SAT-Amikaro liée à SAT. Et d'autres associations: de jeunes, de cheminots, de rockeurs, et bien d'autres.

L'échelon du club local (par exemple notre »centre culturel«) correspond aux besoins du renouvellement et perfectionnement du Mouvement Espérantiste: c'est là que débute la grande majorité des espérantistes. Mais l'échelon international est aussi fondamental, car il correspond aux besoins des »pratiquants« de la langue, que ce soit pour le tourisme, le commerce, la culture, etc.

Alors, si vous ne voulez pas rester cantonnés dans un »espérantisme léthargique«, si par contre vous avez envie de vous ouvrir au monde vaste offert par le Mouvement Espérantiste, n'hésitez pas à nous contacter pour vous

aiguiller.

Et n'oubliez pas que ceci n'exige pas un niveau très pointu en espéranto – au contraire, c'est le meilleur moyen d'avancer dans la langue!

### Votre adhésion à E\*K\*C!

Si vous avez déjà envoyé votre adhésion à E\*K\*C pour l'année 1995-96, nous vous disons »Multajn Dankojn!«

Si vous ne l'avez pas encore fait, vous allez trouver un petit bulletin dans ce numéro du *Krokodilo*. N'attendez pas! Envoyez-le le plus tôt possible – c'est vraiment essentiel pour la vie de l'association! Et alors, à vous aussi nous pourrions dire »Dankegon!«

### Manĝo-Klaĉoj -- novaj datoj

Pro diversaj kalendaraj konsideroj, ni ŝanĝis la daton de kelkaj Manĝo-Klaĉoj, tiel ke ne ĉiu okazos la kutiman unuan vendredon de ĉiu monato.

2 FEB., kiel kutime.

23<sup>25</sup> FEB., plusa Manĝo-Klaĉo pro la veno de Kimie Markarian.

15 MAR. – 5 APR. – 3 MAJ. – 7 JUN.

La Manĝo-Klaĉoj okazas en nia sidejo, ekde 19h30 (kaj laŭeble la biblioteko malfermiĝos je 18h30 por legemuloj). Kosto: 50 F (30 F por studentoj kaj senlaboruloj). Alportu vian manĝilaron. Bonvolu avizi antaŭe Christine Vidotto, 61.62.66.35.

### Stages de dimanche

Un nouveau stage pour débutants va démarrer dimanche le 18 FÉV. Proposez à vos connaissances d'y participer – le premier essai est gratuit. (Voir bulletin ci-joint.)

### Une soirée avec Kimie Markarian

Mercredi 21 FÉV., au Local du CE des Cheminots, rue Marengo.

19h: repas au self SNCF.

20h: présentation du *scroban* par Kimie Markarian.

Mme Markarian est une Japonaise qui a travaillé dans une compagnie d'assurance, comme employée calculatrice, avant de venir vivre en Angleterre où elle a épousé un Britannique.

### La Krokodilo

Informbulteno de Esperanto\***Kultur**\*Centro de Tuluzo. Aperas kvinfoje jare.

Redakta adreso: Jacques Caubel, 15 rue Superbagnères, 31500 Toulouse

Elle apportera pour sa présentation un grand soroban et quantité de petits, afin de permettre au public de s'exercer.

Lisez le résumé de sa conférence dans la rubrique «Getere» p. 4.

### Le soroban dans les écoles de Toulouse

Les 23, 24, et 26 février prochains, cinq écoles vont profiter d'une démonstration de soroban par Mme Kimie Markarian, Japonaise venue faire une tournée de conférences en France pendant le mois de février.

La Calendreta Sant-Çubran et l'école ... puis deux écoles de Balma, enfin l'école primaire de Ste Foy d'Aigrefeuille, accueilleront Mme Markarian, chacune pour une demi-journée.

Mme Markarian s'exprime en espéranto. Ses animations scolaires se feront grâce à un interprète espéranto-français, sauf à l'école

de Ste Foy d'Aigrefeuille, où les enfants de CM2 apprennent depuis la rentrée scolaire la langue internationale, et pourront, on l'espère, suivre la présentation sans intermédiaire.

### Stage international de chant choral en Ariège

sous la direction de Zdravka Bojčeva,  
chef de cœur bulgare  
à Monferrier près de Lavelanet.

Frais d'inscription

< 15 ans ou 3e	160 F	ensuite	240 F
d'une même famille			
de 15 à 26 ans	240 F		320 F
> 26 ans	320 F		400 F

Frais d'hébergement: de 1.200 F à 1.500 F selon chambre.

Renseignements et inscriptions:

Georges Comte, 09120 St. Félix Rieutort, tél. 61.60.86.83.

Vojaĝu ĉisomere!

### Kultura Esperanto-Festivalo en Kopenhago -- 6-11 AUG. 1996

Granda festivalo en Danio! Muziko, teatro, poezio, ĉia E-ista kulturo. Vi mem povas surloke krei: farbi, kanti, ktp. Aliĝu antaŭ la unua de julio, poste kostos pli. Multaj famaj E-istaj artistoj kaj grupoj partoprenos en tiu ĉi festivalo.

Informoj kaj aliĝo:

Jacob Nordfalk, Rådmandsgade 53, 2th., DK-2200 København N

tel. +45 31.83.82.20, faks. +45 35.32.04.60 (indiku »Jacob Nordfalk«), e-poŝto:

## Farite . . . ★ . . . On a Fait

### Tampere: iren kaj reen

Tri tuluzanoj, Gustavo, Maurico, kaj Petro, partoprenis la Jusan Universalan Kongreson, kiu arigis 2400 E-istojn el 80 landoj, de la 22a ĝis la 29a de julio. Ĝi okazis en Tampere, la dua urbo de Finnlando, iom pli ol cent kilometrojn nordokcidente de Helsinko. Aviadile ni vojaĝis iren kaj reen tra Parizo kaj tra la finna ĉefurbo.

Tiel nia triopo efektivigis projekton planitan dum la kurso kreita antaŭ du jaroj en la Junulara Kultur-Domo de kvartalo Ancely. La celo estis malkovri per ni mem Esperantujojn en ties plej tipa internacia manifestado. Ĝi estis plenkusece trafita, tion ni povas diri.

Reziĝinte aliĝi al la franca karavano, kies plano tro multe kostis por ni, ni ne povis krokodili, krom eble iomete inter ni tri. Entute nia grupo elturniĝis en ĉiaj situacioj, transirante en amika etoso la lingvan baron, eĉ se precipe en la komenco la konversacioj estis kelkfoje pli-malpli facilaj. Ĉiuokaze la publikajn paroladojn aŭ diraĵojn ni bone komprenis sen problemo. Krome laŭ cirkonstancoj ni ekrilatis kaj eĉ amikiĝis kun aliaj gekongresanoj, aparte kun la finna korespondantino de unu el ni. Tion sufiĉe montras la fot-albumo!

La kongresa programo estis tre riĉa. Post la interkona vespero ni tre ŝatis la impresan solenan inaŭguron, dum kiu ekzemple prezentiĝis sinsekve la landaj delegitoj; festparoladis la prezidinto John Wells, fama profesoro pri lingvistiko, finanta sian mandaton; ĥore kantis la E-istan himnon ĉirkaŭ du mil starantaj kongresanoj, en vasta salono. Estis same pri la

solena fermo, unu semajnon poste, kun la ĵus elektita prezidanto, la sudkorea universitatano Lee Chong Yeong, kiu ĉirkaŭita de la nova estraro konigis la unuajn konkludojn de tiu ĉi 80a U.K.

Intertempe ni povis laŭplaĉe ĝui akceptojn, konversacian kurson, komitatkunsidojn, prelegojn kaj debatojn por ĉiuj gustoj, laborkunsidojn, ekspozicion pri radioelsendoj en E-o, kiu menciis Tuluzon, riĉan libroservon, nacian vesperon, koncertojn kaj multajn aliajn artajn aranĝojn, ekskursojn – sen kalkuli la budojn nek la konstantan spektaklon en la koridoroj.

Fot-albumon kaj ekspozicion pri tiu sukcesa UK oni vidis dum la Zamenhof-festo.

(Maurice Issert)



### 12a Internacia Festivalo en Rotenburg

Jen la nova jaro: ĝi komenciĝis por mi en Germanio. Ĉu ne bona elekto estas festi la jarfinojn inter 170 aliaj E-istoj devenantaj el 19 landoj? Mi estis de la 27a de decembro ĝis la 3a de januaro en Esperantujo, pli precize mi partoprenis kun aliaj tuluzanoj la 12an Internacian Festivalon en la junulargastejo de Rotenburg.

Rotenburg multe plaĉis al mi. Ĝi estas vere bela kaj ĉarma urbo, sukcese renovigita en la lastaj dek jaroj.

Kiel kutime dum tiu ĉi internacia festivalo vi povas imagi nian grandan embarason por elekto tiun aŭ alian prelegon. Kion fari inter tiom da

eblecoj por natura kuracado: premkneda tera-  
pio (japana diina masaĝo), angiopuriga sintrej-  
nado, tibeta tradicia medicino, aroma tera-  
pio, kuracherba seminario, floresenca sistemo... e-  
c. bierseminario por saneco!

Kiel logike okazis ĉiutage laŭdezira infan-  
programo. La kulturaj prelegoj alportis grandan  
profiton al multaj E-istoj. Mi devas paroli an-  
kaŭ pri la ekskursita tago al Hamburgo. Ĝi oka-  
zis per buso dum malvarmega vetero (-17 gra-  
doj). Imagu la frostitajn nazojn de niaj tuluzanoj!  
Ĉu? Feliĉe varmigi nin la tagmanĝo kaj la  
bona etoso en greka restoracio.

Mi ĉiam memoros la simpatian kunvenojn pri  
origami, la japana paperfaldado, kaj la nefor-  
geseblan tuj-post-matenmanĝan gimnastikon.

Rilate la vesperojn mi ne povas ĉion detali,  
sed ili estis diversspecaj: ĉeĥa, irana, litova,  
germana... kaj internaciaj. Mirinda, la tradicia  
silvestra vespero estis plensukcesa, ĉar la vi-  
gla kaj estimata HDP (komprenu Hans Dieter  
Platz), bonvenigis la novjaron. Ne plu ekzistis  
germanoj, francoj, nederlandanoj, britoj, italoj,  
rusoj, poloj, belgoj - sed nur viroj, virinoj, kaj  
infanoj, kiuj dancadis ĝis la kvina en la novjara  
tago.

Ni dankegas H.D. Platz, kiu sindone zorgis  
pri tiu ĉi 12a IF en Rotenburg. Ĝis la venonta  
jarfino en Germanio! Ĉu ankaŭ vi...?

(Josée Lafosse)

## Zamenhof-festo

Denove la fervojistoj organizis la tradician  
Zamenhoftagon, 17 DEC. 95. Kvindek homoj



La photo de famille

partoprenis - iom malpli ol kutime pro la stri-  
ko... de la fervojistoj! Unue oni bone manĝis, ĉu  
viande, ĉu vegetare. D-ro Albault prelegis pri  
apartaj eventoj en la vivo de Zamenhof. Li me-  
morigis al ni la morton de Raymond Pons, akti-  
va E-isto en Ariège, kiu redaktis la revuo *Es-  
péranto-Pyrénées*.

La posttagmeza programo daŭris du horojn.  
Bogumil Włodarski ludis violonon. Jeannette  
Cash parolis pri la alveno en junio de infanoj el  
Kiev. Vilhelmo Lutermann kaj Michel Lafosse  
rakontis pri SNCFaj problemoj kaj nostalgio al  
malnova lokomotivo. Kiel kutime oni prezentis  
pomon kaj skeĉojn.

Rikardo Cash kaj Flo Martorell tenis budojn  
kun libroj kaj kasedoj. Maurice Issert surmuri-  
gis fotojn de la lasta universala kongreso, kien  
iris kelkaj tuluzanoj.

## Espéranto à Radio Mon País

L'émission *Amplitude 360*, de M. Fouge-  
rousse, accueille chaque mois depuis novem-  
bre dernier, quelques E-istes réunis autour de  
Maurice Issert.

À la première émission le 22 NOV. ont parti-  
cipé Gaston Cathala, Jacques Caubel, Pierre  
Junyent, et Josée Lafosse. Le seconde à eu  
lieu le 10 JAN., avec participation de M. Chris-  
tian Beaumelou, ancien principal de collège à  
Albi.

Deux autres émissions sont prévues: le 21  
FÉV. et le 20 MAR., cette dernière avec parti-  
cipation de C. Beaumelou et Josée Lafosse.

Le contenu des émissions est didactique,  
puisqu'il s'agit de la découverte d'une langue à  
partir de l'analyse de textes, musicaux ou non.  
Elles comprennent bien entendu de nombreux  
intermèdes musicaux.

90,1 MHz, Radio Mon País, *Amplitu-  
de 360*, 11h-12h.

## Pireneo: Horo kantis en E-o

La Horo de Lavedan (65) organizis koncer-  
ton dimanĉe la 10 DEC. 95 je la 17h ĉe Casino  
d'Argelès-Gazost. Unu programero estis  
»Pacokanto de la E-istoj«. Post la koncerto  
pluraj personoj montris interesigon pri E-o.

(Jacques Morin)

## Cetere . . . ★ . . . En Plus

Rubriko Biblioteko

### Nova malnova libro

*Jen ĉifoje la bibliotekisto de E\*K\*C pa-  
rolos pri libro ne aparte facila. Temas pri:*

ŜIRJAEV Ivan Gennadieviĉ (1.1): *Sen titolo*.  
Originala romano. Eble inkunablo de espe-  
ranto. Pro Esperanto, WIEN 1995. 336p.  
17x24cm. (48 NGL [150 FRF] ĉe UEA.)

*Aŭtoro:* Ivan Gennadieviĉ Ŝirjaef  
(1877-1933) estis grekortodoksa pastro. Li  
lernis E-on ĉirkaŭ 1895, kaj grave kontribuis al  
la frua literaturo. Li estis ĉefredaktoro de *En-  
ciklopedio de E-o* (1933).

*Fono:* Verŝajne la plej frue (almenaŭ parte)  
verkita originala romano en E-o. La manuskrip-

to, kun multaj aliaj de la sama aŭtoro, restis  
dum preskaŭ jarcento neeldonita, kaŝita inter  
la arkivaĵoj de Internacia E-Muzeo de Vieno.

*Temo:* unu jaron el la vivo de Jozefo, mal-  
riĉa knabo en nordrusa urbo kie li studas por  
fariĝi pastro. Leginte en ĵurnalo pri E-o, li tuj  
entuziasmas, kaj lerninte ĝin li instruas kaj  
propagandas. Kelkaj personoj kun alta socia  
rango aliĝas, inter ili la ĉarma junulino Olnjo,  
kiu fariĝas lia paca kunbatalanto. Jozefo pasi-  
gas la plej feliĉan periodon de sia vivo kaj  
spertas sian unuan amon. La romano verŝajne  
havas almenaŭ parte aŭtobiografia fono.

*Intereso:* Tre bel- sed simpla-stile verkita,  
kun patoso - sed kun ankaŭ dozezo da iro-

nio —, la romano transportas nin al la unua jardeko de la E-movado. Malgraŭ la tempa malproksimeco, la romano konservas grandan aktualulecon: ni konstatas ke praktike ĉiuj elementoj de la nuna Movado jam ekzistis.

**Lingvaĵo:** Oni apenaŭ rimarkas malsamecon dis de hodiaŭa lingvaĵo (multaj etaj eraroj estis forredaktitaj). Oni lasis kelkajn dubajn formojn, ekz-e multegajn *tia, kia, ktp.*, anstataŭ *tiu, kiu*,

ktp. (sed tio estas trovebla hodiaŭ ĉe altetaksataj aŭtoroj). Aliflanke, oni feliĉe lasis la arkaismojn kiuj trovigas ankaŭ en zamenhofa uzado, kio donas tute originalan guston kaj montras la tratempan evoluon de E-o.

**Takso:** Pro la nekutimeco de la lingvaĵo, tiu ĉi libro estas nerekomendinda al komencantoj. Sed jam iom spertaj lingvanoj povos profite frandi ĝin. (Rikardo Cash)

## Le soroban

par Kimie Markarian

Le *soroban* est le nom japonais du boulier importé de Chine au Japon au 16e siècle. Son évolution pendant presque trois siècles s'est faite au Japon sans influence des cultures européennes, et a beaucoup contribué au progrès des mathématiques dans le pays. Lorsque après une longue période d'isolement, le Japon s'est ouvert à l'étranger au 19e siècle, les chiffres arabes y ont été introduits, et la structure du soroban en a été modifiée, pour trouver sa forme actuelle.

La nouvelle structure du soroban, ainsi que l'utilisation des chiffres arabes, a permis de traiter une quantité de calculs, dans notre 20e siècle en progrès rapide, puisque le soroban, manipulé par un spécialiste bien entraîné, pouvait être aussi rapide qu'un ordinateur ou une calculatrice électronique.

L'habileté à manier le soroban était attesté par un examen, tout comme la sténographie ou la dactylographie, organisé par la Chambre de Commerce et d'Industrie. À la fin des années 50, plus d'un million de personnes se présentaient chaque année à cet examen.

Les employés au soroban, travaillaient comme des machines à calcul. Par suite de l'introduction de l'ordinateur dans les années 70, le calcul traditionnel à grande échelle a disparu dans les grandes firmes, mais il subsistait encore aujourd'hui des employés qui préfèrent utiliser le soroban pour leur travail. Il existe encore actuellement au Japon 12.000 écoles de soroban, et 30.000 maîtres enseignent cet art.



En Europe, un boulier semblable au soroban a existé jusqu'à la fin du 16e siècle, mais a tout à fait disparu. C'est pourquoi les Européens sont surpris par notre démonstration. Le soroban est cependant de plus en plus utilisé hors d'Asie, parce que les éducateurs lui ont reconnu une valeur pédagogique à l'école: son usage aide à comprendre la notion de nombre et de système de numération. Les enfants apprenent ces notions sans même s'en rendre compte, car pour eux le soroban est un jouet intéressant. Son utilisation a des avantages que ne présente pas la calculette électronique, entre autre une valeur intuitive et l'exercice équilibré des deux hémisphères cérébraux, droit et gauche, à ce qu'affirment les psychologues.

## Kalendaro

*Ne forgesu — baldaŭ en Tuluzo*

2 FEB. *Mango-Klaĉo.*

18 FEB. *dimanĉa kursaro en Ancely (9h-17h).*

21-24 FEB. Kimie présente ses bouliers japonais.

25 FEB.-3 MAR. chantez et skiez dans l'Ariège.

15 MAR. *Mango-Klaĉo.*

17 MAR. Ancely, kursaro kaj tagmanĝo

7 APR. Kursaro en Ancely

2 JUN. Prima de las Langas, Place du Capitole.

Et chaque mardi, de 16h à 18h, permanence pour toute information sur l'espéranto et les activités d'EKC, au 1 rue Jean Aillet.

### La aliaj okazaĵoj en Esperantujo

27-28 JAN. Kursaro en Bordeaux.

10-11 FEB. E-Kursaro de Esperanto-44, en Nantes.

25 FEB.-3 MAR. 7a Esperanto-Flor-Trejnado en La Freychède.

1-8 APR. Printempa Semajno Internacia (ĉefe por familioj) en Duderstadt, Germanio.

1-8 APR. 2a Printempa Lernejo Internacia (por dekelkjaruloj), samtempe kaj -loke kun PSI.

6-8 APR. 51a SAT-Amikara E-Kongreso en Orly.

13-19 MAJ. Franca E-Kongreso en Lyon.

13-19 MAJ. Internacia Junulara Renkontiĝo en Lyon.

25 MAJ. Koncerto de Jak Yvart ĉe Bijou en Toulouse.

25-27 MAJ. E-Kursaro de Esperanto-44, en Pouliguen.

13-20 JUL. 69a SAT-Kongreso en Sankta-Peterburgo, Rusio.

20-27 JUL. 81a UK en Prago, Ĉeĥio.

29 JUL.-5 AŬG. 52a Internacia Junulara Kongreso en Güntersberge, Germanio. Temo: »Formoj de kunvivado«.

6-11 AŬG. 5a Kultura E-Festivalo, Kopenhago, Danio

Por pli da detaloj pri tiuj ĉi kaj pri aliaj renkontiĝoj, klavu  
3615 ESPERANTO!

# Accueillons des enfants de Kiev

## Le projet

L'association **Esperanto-Kultur-Centro** (*Centre Culturel Espéranto*) de Toulouse a parmi ses buts d'« encourager les relations et les échanges entre personnes de culture et de langue différentes ».

Elle se propose, en collaboration avec **Ukraina Esperanto-Asocio** (Association Ukrainienne d'Espéranto), d'inviter à Toulouse pendant un mois dix enfants de Kiev.


Les enfants de Kiev (Ukraine) ont tous subi les conséquences de la catastrophe de Tchernobyl, car la centrale nucléaire sinistrée en 1986 n'est qu'à 80 km. Certains quartiers de la ville sont constitués par des familles réfugiées, évacuées de villages trop proches de Tchernobyl.

Dans cette ville, où la langue espéranto a une longue tradition, des classes entières l'apprennent comme matière obligatoire. Ce sont des élèves de ces classes que nous invitons à Toulouse.

## Objectifs

- Permettre aux enfants de Kiev de faire connaissance avec Toulouse, et notre région.
- Donner aux enfants de Kiev une chance de restaurer un peu les effets négatifs sur leur santé de la catastrophe de Tchernobyl.
- Permettre aux élèves toulousains une ouverture sur une autre culture, sur l'humanitaire, et sur l'écologie.
- Promouvoir un véritable échange culturel, passant par une communication linguistique.

à  
Toulouse



# et en Ariège



## Déroulement du projet

- Durant l'année scolaire 95/96, la classe de CM2 de l'École de Ste Foy d'Aigrefeuille (31) s'initie à la langue espéranto et correspond avec les élèves du lycée de Kiev.
- Du 15 au 30 juin 1996: les dix élèves de Kiev et leur accompagnateur seront reçus à l'école de Ste Foy d'Aigrefeuille et hébergés dans les familles des élèves. Ils participeront aux activités scolaires, fêtes de fin d'année, visiteront Toulouse, et prendront les repas à la cantine comme leurs camarades.
- Du 1er juillet au 4 juillet: Les enfants de Kiev seront reçus dans les familles d'élèves du Collège Victor Hugo de Carmaux (81), qui étudient l'espéranto en vue de cet accueil.
- Du 5 au 15 juillet 96, les dix enfants ukrainiens avec autant de camarades de Ste Foy d'Aigrefeuille, feront un séjour en Ariège, dans une ferme-gîte d'enfants, à quelques kilomètres de St Girons et au pied des Pyrénées.

Aidez-nous à payer leur voyage

---

### Bulletin de souscription / Donackupono

Nom / Nomo

Adresse / Adreso

fait un don de / Donacas

F pour permettre l'accueil en France de 10 enfants de KIEV, selon le projet de E.K.C. / Por ebligi akcepton de 10 kievaj infanoj en Francion, laŭ la E.K.C.-projekto.

Ch. bancaire/postal/espèces à l'ordre de: E.K.C. »Enfants de Kiev«

---

Esperanto-Kultur-Centro, 1 rue Jean Aillet, 31000 TOULOUSE